

Supera nivelo (C1)

Unua serio

kodo: s81

I. Lingvokonaj taskoj

Rimarko: Ĉiu bona solvo valoras 1 tasko-pojnton. Estas akireblaj 40 tasko-pojntoj. Duonigu la finan rezulton por ricevi la ekzameno-pojntojn.

1.

1. dum
2. de
3. en
4. da
5. por

2.

1. iĝ
2. ig
3. ec / iĝ
4. ej
5. ind / --

3.

1. laŭ kiu
2. malantaŭ kiu
3. kiuj ĉiuj
4. kiaj
5. per kiaj

4.

1. farbitaj
2. malpliigintaj / malpliigantaj
3. blovanta
4. serĉante
5. permesata / permesita

5.

	a	b	c	d
1.	x			
2.			x	
3.				x
4.	x			
5.				x
6.				x
7.		x		
8.		x		
9.	x			
10.			x	
11.		x		
12.				x
13.		x		
14.				x
15.			x	
16.				x
17.				x
18.	x			
19.		x		
20.			x	

II. Komentariado

Mi konjektas, ke en tiu ĉi teksto temas pri la legkapablo de unuagradaj lernejoj en sia gepatra lingvo. La frazo „la lernantoj ne multe komprenas la legitajn tekstojn” estas malpreciza. Ĉu temas pri ĉiuj lernantoj? Kiu procento estas „ne multe”? Plie mi ne komprenas kiel oni povas difini kaj pritaksi la kvaliton de la cerbumado. Eĉ se oni povas pritaksi tian kvaliton, ĉu la notoj estas pli aŭ malpli altaj ol la tiel nomata kvalito de la cerbumado? La malprecizeco de la teksto ankoraŭ evidentiĝas en la esprimo „ĝeneralaj kapabloj” kaj „kapablo praktike uzi la akiritajn konojn”. Laste diferencoj inter lernantoj de diversaj lernejoj ne devus surprizi specialistojn pri pedagogio, ĉar la sociaj kaj kulturaj devenoj de la lernantoj diferencas inter diversaj lernejoj.

Konklude, mi opinias, ke tiu teksto estas nebula kaj seninteresa, kiel tre ofte la diroj de sciencistoj pri instruado.

III. Skriba sinesprimo

Kara Federica,

Venecio, la 8-an de Junio 2008.

Finfine mi kapblis akiri tiun retaliron ADSL, pri kiu mi parolis antaŭ kelkaj semajnoj. Kaj mi tuj komencis eluzi ĝin. Unu el la ebloj, certe interesa por kinamantino, kiel vi, estas elŝuti filmojn, kaj novajn, kaj malnovegajn. Verdire oni devus uzi laŭlegajn retejojn, de kiuj, pagante per kreditkarto, oni povas elekti sian filmon el ampleksa propono. Tamen, preskaŭ ĉiuj (kaj mi kun ili) uzas senpagajn servojn, pere de softvaroj kiel *WinMx* kaj *eMule*, kiuj permesas interŝanĝi filmojn inter privataj uzantoj de la reto.

Sed ne ĉiuj filmoj taŭgas, laŭ mi, por esti spektataj hejme: ja mi ne posedas grandan televidilon, do mi devas rigardi la filmojn sur la ekrano de mia komputilo. Kaj, se tio taŭgas por normalaj filmoj, kie la rakonto rolas la ĉefan parton, ne estas bona solvo por tiuj filmoj, kiujn ni ege ŝatas, sciencfikciajn kaj fantastajn: ili bezonas specialan etoson, kiun donas nur grandega ekrano kun bonega sonsistemo. Do, malkovrinte tion, mi decidis uzi interreton nur por serĉi tiujn filmojn, kiujn mi maltrafis, kaj kiujn ne plu eblas spekti en bona kinejo.

Tamen, bonvolu ne kredi, ke mi pasigas la tutan tagon spektante filmojn elŝutitajn, kiel aliaj homoj faras forgesante, ke ekstere daŭre ekzistas suno; unu komputilo laboras la tutan tagon por mi por trovi la filmojn, sed mi elektos poste la taŭgan horon por rigardi ilin. Ili atendas min, kaj kiam mi decidus, ili revekiĝas. Tio estas bona uzo de interreto, por ne fariĝi sklavo de ĝi: mi konscias, ke tio estas danĝero lige al la tutmonda konektsistemo, tamen ĝuste pro tio mi intencas rajdi sur la tigro kaj ne esti manĝita de ĝi. Ĉu mi sukcesos? Mi esperas, ke jes... intertempe mi registris kelkajn filmojn, kiujn mi ŝategus spekti kun vi; simple elektu la tagon, kaj ni komencu.

Kison. Federico

IV. Lega kompreno

IV/A

1.

1.	2.	3.	4.	5.	6.	7.
b	c	a	c	b	c	c

2.

1.	2.	3.	4.	5.
35	2-3, kelkaj	53	37	5

IV/B

1.	2.	3.	4.	5.	6.	7.	8.
----	----	----	----	----	----	----	----

b	h	a	d	f	g	e	c
---	---	---	---	---	---	---	---